



«LE GROUPE ESPERANTO DU MAINE» SALUTAS VIN!



Bonvenigaj vortoj

*«Vintro kovras mian kapon, tamen eterna
printempo vivas en mia koro»*


Victor Hugo

Enhavo

Sarta esperanta aktualaĵo	P1
Le Mans festis sian faman konkurson	P2-3
Limoncello	P4
Indignu! <i>Stéphane Hessel</i>	P5

La GEM sincere deziras al ĉiuj
feliĉon, sanon kaj pacon en nia
mondo ne forgesante :

*«Esperanto estas la ŝlosilo de la
tuta mondo kaj de bonaj koroj»*
Andreo Cseh



**Sole oni iras pli rapide,
kune oni iras pli fore.**

Afrika proverbo

En la Universitato «Le Mans»

de 17h
le 19 octobre
à 18h
le 20 octobre

Don't miss He pronyckajrte
Ne manquez pas
Ne manquez pas
No te pierdas لا تفوت
les 25h
LANGUES & CULTURES
농치지 마세요

Un concours de productions plurilingues
Pour vous inscrire, écrivez à l'adresse suivante: pointerculture-mi@univ-lemans.fr ou scannez le code QR ci-dessus.

Des animations
Ateliers interculturels et de découvertes de langues, expositions, football gaélique, dégustations culinaires et d'autres surprises vous attendent!
Pour en savoir plus sur le programme, rendez-vous sur notre page Facebook : <https://www.facebook.com/maisondeslangues.CieL> ou scannez le code QR ci-dessus.

LES TRIBULIONS DU PLATEAU
AMIGOS
Tadaima
SITCOM
Le Mans Université | Maison des Langues

La 25 horoj de Lingvoj kaj Kulturoj

La 19-a kaj 20-a de oktobro okazis tutnova loka aranĝo nomita «25 horoj de lingvoj kaj kulturoj» iniciita de la Mansa Universitato.

Pluraj lingvaj asocioj konsentis partopreni. Tiu estis bona oportunaĵo por prezenti Esperanton al juna kaj internacia publiko.

Bedaŭrinde la terura atenco la 13-an de oktobro kontraŭ profesoro en la urbo Arras, ŝanĝigis kondiĉojn de sekureco kaj la organizantoj devis pli atenti kaj fermi kelkajn lokojn.

Tamen ni renkontis plurajn studentojn el Iranio, Ukrainio, Barato, Koreio... kaj ni estis «ĵuriano» por artaj konkuroj inter grupoj de studentoj. Inter pluraj temoj estis tiu ĉi:

«Imagu kaj priskribu vian idealan landon»

Ni spektis altkvalitajn teatrajn scenetojn plenajn je sentemo kaj humaneco.

Centjariĝo de la mondfama konkurso «24 Horoj de Le Mans»

La «24 Horoj de Le Mans» festis sian centjariĝon en 2023 kvankam temis nur pri la 91-a aŭtokonkurso;

S-ro Georges Durand, ĝenerala sekretario de ACO «Aŭtomobila Klubo de Okcidento» organizis la unuan konkurson la 26-an de majo 1923 kie 33 sagrapidaj veturiloj ekstartis sur la aŭtokurejo de la departemento «Sarthe» por veturi dum 24 horoj.



Okaze de tiu centjariĝo multaj konstru-fabrikaj kaj 186 stiristoj engaĝis sin. Tio promesis emociegan eventon.

La konkurso «24 horoj» estis ĉiam prov-benka por plibonigi aŭtomobilajn teknikojn, exemple nun veturilo kun hidrogena motoro estis experimentata por la venonta konkurso. Tiu aŭtokonkurso estas mondfama.

Tiu centjarfesto estis preparita de longe. Jen la ĉefaj punktoj:

- Pliriĉiĝo de la «Aŭtomobil-muzeo de Le Mans» per prezentado de premiitaj veturiloj dum la «24 horoj».

- Grava reklamo en la lokaj kaj naciaj amaskomunikiloj: (bildstrioj, libroj, revuoj, apartaj broŝuroj, gazetoj...) Flagrubandoj kun enskribo «Of Course Le Mans» (*) floris ĉie tra la urbo.

- Konstruo de du monumentoj honore al tiu centjariĝo.

Eĉ la tram-vagonaro estis farbita laŭ la koloroj de la «24 Horoj».

Mi bonŝancis atente sekvi la fariĝojn dum la semajno antaŭ la konkurso. Dume aranĝoj okazis en le Mans kaj en la apudaj urbetoj.

Kelkaj el ili situas -aŭ origine situis- sur la vojo de la kurejo.

Jen kelkaj:

Urbeto *Mulsanne* festis la «Vojkurbiĝon de *Mulsanne*» pere de ekspozicio de veturiloj honore al la firmao «Peugeot».

Multnombra publiko ĉeestis.

Najbara urbeto Arnage ankaŭ festis sian «Vojkurbiĝo de Arnage» restarigita kun budoj kaj aŭtodefilado.



En la urbeto Arnage

En la mansa kvartalo *Pontlieue* estis memorigita la «eksa Vojkurbiĝo de Pontlieue» elektita loko de la publiko por admiri la konkurson.

Urbeto *Ruaudin* pere de la «*R'Hunaudières*» festis la 50-jariĝon de la gajninta aŭtomobilo de Henri Pescarolo. Tiu piloto partoprenis tiun konkurson 33 foje.

Urbeto «*Saint Saturnin*» pere de ĝia «*British Classic Welcome*» ekspoziciis britajn kaj «Ferrari» veturilojn.

Urbeto *Neuille* pere de «*Neuille dans la course*» aukaŭ partoprenis kun britaj veturiloj kaj subĉiela projekcio de la oficiala filmo «24 horoj».

Sen citi la multnombrajn prelegojn, filmojn, fotajn ekspoziciojn pri tiu centjariĝo .

La pesado kaj validigo de la veturiloj, la pilotparado en la urbocentro estis tre ŝatataj momentoj kiuj kunigis multnombrian publikon. Speciala trofeo nomita «100-a datreveno» estis kreita por tiu evento.

Sabaton la 10-an de junio, je la 16-a horo okazis la konkurstarto kun 62 validitaj veturiloj.

Dume la «*Patrouille de France*», elitaj aviadistoj superflugis la aŭtokurejon antaŭita de la impona kargo-avio A400M.

Dimanĉon la 11-an de julio akurate je le 16-a horo ĉesis la konkurso.

La granda venkinto estis la «*Scuderia Ferrari*» kiu ne gajnis la konkurson de antaŭ 50 jaroj! Kelkaj amaskomunikiloj taksis tiujn «24 horoj» kiel la sportan eventon de la jaro, kiel planedan rendezuon aŭ kiel la jarcentan konkurson.

Neniu grava incidento okazis dum la konkurso kaj la vetero estis favora.

Laŭ S-ro Pierre Fillon, prezidanto de ACO estis tre bona jaro.



En la kvartalo Pontlieue

:Of course
LE MANS

:Of course

(*) Vortludo inter la angla esprimo «of course» kiu signifas «evidente» kaj la franca vorto «course» «kurado inter konkurantoj»

Legu pli: <https://www.24h-lemans.com/>

LIMONCELLO



Kion ni povas memori post restado en Italio?
Multajn belajn artajn kaj bongustajn aferojn kompreneble sed
inter ĉiuj, lokan recepton de likvoro « Limoncello »

Kio estas « Limoncello »?

Limoncello estas citrona likvoro kiu devenas de Italio, kaj estas produktita en la duoninsulo de Sorrente, de la golfeto de Napolo ĝis la Amalfibordo kaj ankaŭ en Sicilio, Sardinio kaj Kalabrio. Tiu likvoro baziĝas sur citrona ŝelo, alkoholo, akvo kaj sukero. Ĝi aspektas flavkolora, estas dolĉa kun bona citrona gusto.

Ĝi estas produktita per macerado de citronaj ŝeloj en alkoholo dum pluraj tagoj. Dolĉa, aroma ni povas proponi ĝin kiel aperitivo kaj ankaŭ kiel digestilo, aŭ kiel koktelo. Farante ĝin hejme ni povas elekti la alkohol- kaj sukergradon ene de la drinkaĵo.

Ingrediencoj por prepari bongustan Limoncellon:

- 5 citronoj de ekoagrikulturo
- unu litro da 40-grada alkoholo aŭ duonlitro da 90-grada alkoholo
- sukero kaj akvo laŭ via elekto

Necesaj iloj

- senŝeligilo
- fermebla ujo por macerado

Unua etapo: macerado

- purigi la citronojn
- senŝeligi la citronojn por ekhavi etajn maldikajn ŝelojn de citrono (sen la blanka parto kiu amarigus la preparadon)
- enmeti la ŝelerojn kaj alkoholon en fermotan ujon protektitan kontraŭ lumo.
- lasi ilin maceri dum 30 tagoj
- movi ĉion ĉiujn 5 tagojn
- Post 30 tagoj: filtri la miksaĵon.

Dua etapo: preparado de la likvoro: sukero + akvo laŭ via gusto.

Se vi volas drinkaĵon inter 28 kaj 32°:

Po unu litro da pura 90-grada alkoholo (ne trovebla en Francio): 2 litroj da akvo

Po unu litro da pura 40-grada alkoholo: 0,4 litro da akvo

Inter 400 kaj 500 gramoj da sukero po unu litro da 90-grada alkoholo

Inter 200 kaj 250 gramoj da sukero po unu litro da 40-grada alkoholo

En kaserolo, solvi la sukeron en la akvon.

Kiam la siropo estas malvarma miksi ĝin kun la alkoholo en botelo: la likvoro nebuliĝas, fariĝas glata kaj belaspektas kiel Limoncello.

Konservi la botelon en freŝa, seka kaj senluma loko dum 10 tagoj.

Poste enmeti ĝin en la fridujon.

Via « Limoncello » estas preta por gustumado !



INDIGNU! (2010)

Stéphane Hessel (1917-2013)


Mi deziras, ke vi ĉiuj, ke ĉiu el vi, havu sian motivon por indigno. Tiu ĉi grandvaloras. Kiam io indignigas onin same kiel mi estis indignigita de la naziismo, tiam oni fariĝas batalanto, forta kaj engaĝiĝema. Oni partoprenas en la historifluro, kaj tiu granda fluro devas pluri dank'al ĉiu. Kaj tiu fluro iras al pli da justo, pli da libero, sed ne al tiu senkontrola libero de la vulpo en la kokinejo. Tiuj rajtoj, kies programon redaktis la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj en 1948, estas universalaj. Se vi renkontos iun, kiu ne ĝuas ilin, kompatu lin, helpu lin konkeri ilin. [...]

Al la gejunuloj, mi diras: rigardu ĉirkaŭ vi, tie vi trovos la temojn, kiuj pravigas vian indignon – la traktadon truditan al la enmigrintoj, al la senlegitimuloj, al la Romaoj-Ciganoj. Vi trovos konkretajn situaciojn, kiuj kondukos vin iniciati fortan civitanan agadon. Serĉu kaj vi trovos!

Tradukis:

BACHIMONT Yves, BALLAGUY René, BENSIMON Claude, BERNARD Céline, CLOPEAU Georges-Henri, CORVAISIER Bernard, DUCLOYER Jean-Pierre, GAUFILET Nicolas, LABETAA Claude, LE DRU Elisabeth, MARIN Jean, MANU, RIVIERE Christian, ROUSSEAU Axel, STRIDE François, SIGNORET Paul.

Multan dankon al ili!



Stéphane Hessel, naskiĝis la 20-an de oktobro en 1917 en Berlino (Germanio) kaj forpasis la 27-an de februaro 2013 en Parizo (Francio).

Diplomato, partizano, verkisto kaj politika aktivulo por la homaj rajtoj li alvenis en Francio kiam li estis 8 jaraĝa kaj iĝis franca en 1941.